


Tributo al Fidel Castro en la tombejo Santa Ifigenia



Santiago de Cuba, 5 dec (RHK) Ekde tiu ĉi-dimanĝo malfermiĝis la pordego de la tombejo Santa Ifigenia, en Santiago de Kubo, kie ripozas la mortrestaĵoj de la historia gvidanto Fidel Castro.

Kune kun la popolo, kiu portas florojn al Fidel, ankaŭ centoj da ĵurnalistoj el ĉiuj mondopartoj vicas de antaŭ kelkaj horoj por kapti bildojn de la loko.

La aŭtoritatuloj metis ĉirkaŭbarilojn por ordigi la eniron de la pilgrimantoj kiuj daŭre alvenas ĉis la tombejo. Ĉiun horon oni ĉantas la honorgardistojn kaj aŭdeblas la muziko de la kanto "Eterna Fidel".

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/114393-tributo-al-fidel-castro-en-la-tombejo-santa-ifigenia>



Radio Habana Cuba